

PROGRAMSKIZO de la 53-a Virtuala Esperanto-Konferenco ILEI (VEKI) 25-31 julio 2020

7 tagoj – 7 temoj

1. Solena inaŭguro, prelegoj pri la kongresa temo. Planeda pripenso.
2. Pripensoj pri strukturo. Komitato
3. Prelegoj pri lingvoj. Lingva festivalo
4. Prelegoj pri interlingvistiko kaj Eo en universitatoj
5. Mastrumado de la Ligo. IPR, JA. Vivo de ILEI, demandoj kaj respondoj. Gastronomia rondo.
6. Pedagogiaj temoj. Instruspertoj
7. AMO – seminario. Internaciaj agadoj, internaciaj institucioj / Konkludo

Tempoplano																										
UTC+2		NL		CH		de ES		ĝis DE																		
01	02	03	04	05	06	07	08	09	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	00			
				Kalifornia sunsubiro								ĉefplado				Azia tagiĝo										
UTC + 9		JP		KR																						
08	09	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	00	01	02	03	04	05	06	07			
UTC – 8		USA		okcidento																						
14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	00	01	02	03	04	05	06	07	08	09	10	11	12	13			

Blua koloro = ripozo, dormo Verda koloro = aktivajtoj

La azia tagiĝo komenciĝos per tridekminuta **japana jogo-kurso**, kiun Mirejo donos.

Ĉiu tago havas sian **temon** kaj **tri sesiojn**; la tago kongruas kun la tago en UTC + 2 (Afriko, Eŭropo). Inter la aktivaĵoj verdaj sur la tempoplano la kanalo estos libera por **koridoraj babladoj**, kiel en kongreso. Sen ia gvidado.

Anstataŭ Nacia Vespero ni havos **Planedan Pripenson**.

La kutima frandvespero, kiu kutime malfermas la kunvenon de ILEI, havos taŭgan nomon: **gastronomia rondo**: filmu iun tipe tradician manĝon ĉe vi kun familianoj aŭ geamikoj kaj sendu ĝin al ILEI. Maksimuma daŭro: 3 – 5

minutoj. Nepre komencu dirante vian nomon, urbon kaj landon. Montru kaj nomu la manĝaĵon en via lingvo kaj en Esperanto, la manĝmanieron, komentu la manĝaĵojn, originon de ili, kuirmanieron... en kiu okazo oni manĝas tion. Ni havos dum VEKI sesion, kie tiuj filmetoj sekvos unu la alian. Sendu ilin al Elena Nadikova uzante ilei.sekretario@gmail.com.

Koncertoj, deklamadoj: ni alvokas al artistoj, petante, ke ili sendu filmeton kun hejma koncerto por ILEI ĝis la 30-a de junio. Daŭro: inter 30 minutoj kaj unu horo. Ni deziras havi en ĉiu sesio la lastan horon kun koncerto. Tio estas, ke ni devus akiri 30 kontribuojn. Ankaŭ povos esti koncertoj en rekta enreta partopreno; por tio iu artisto aŭ artista grupo povas skribi al ilei.prezidanto@gmail.com, dirante: mi pretas ludi je tiu tago je tiu horo! Bonvenon! Pro tio ni ne havos Internacian Vesperon, ĉar ni ne vesperumos samtempe!

La **teknika aspekto:** La konferenco akiros kanalon alireblan per numero kaj pasvorto, kiun ni vaste komunikos antaŭe per nia retejo www.ilei.info.

Komenco: sabate la 25-an de julio, ĉefplado 15 :00 UTC + 2: Solena inaŭguro.

Fino: vendrede la 31-an de julio, azia tagiĝo, 00:00 UTC + 2: Konkludo, adiaŭo.

Ni provos eldoni Konferencan Libron kun resumoj de la prezentaĵoj, filmoj, debatoj, decidoj. Ni faros magran eldonkvanton, tamen ni bezonas kelkajn ekzemplerojn por la bibliotekoj. Pro tio ILEI **alvokas al donacoj** por kovri tiujn kostojn kaj por kovri la kostojn de la reta agado.

La partopreno estos senpaga.

Konstanta informfluo okazas en la ĉefpaĝo de ILEI www.ilei.info